

Esperante oni povas nur ami

Artikolo de BÁLINT Orsolya en hungara gazeto Népszava, la 1an de majo, 2022

Hungario iam estis superpovo en la Esperanta Mondo, ĝia ĉi-landa asocio havis pli ol sep mil membrojn ĉe sia zenito. Post 2000 la devigo fari lingvan ekzamenon estis enkondukita, por akiri supergradan diplomon. Ĝis hodiaŭ ĉirkaŭ 35.000 provis uzi Esperanton por ĉi tiu celo, ĉar la nivelo de lingvaj ekzamenoj povas esti atingita memlerne en ĉ. tri intensaj monatoj. La prezidanto de la hungara asocio nun lobios por la inkludo de la "multlingva akcelilo" – metodo por subteni sciencbazan lingvolernadon – en la rekomendojn pri edukado dum la plenkunsido de la Konferenco pri la Estonteco de Eŭropo, kiu komenciĝos je la fino de la semajno. Laŭ la longperspektivaj esperoj de la esperantistoj Esperanto povus esti la "lingvafrankao", la plej grava komunika lingvo de Eŭropo, serĉanta novan identecon.



Foto: Béres Márton | Forrás: Népszava

Esperante oni povas nur ami...

"Ni batalas por du vortoj, ke ili estu enmetitaj en parentezan tekston de la Rekomendo" – resumas la ŝajne atingeblan celon István Szabolcs, afergvida prezidanto kaj ambasadoro de Hungaria Esperanto-Asocio ĉe la monda kaj eŭropa asocioj de Esperanto. Sed ĉiu, kiu scias kiel funkcias la burokratia maŝinaro de EU, povas diri, ke du vortoj povas decidi pri milionoj da eŭroj kaj efektiva ŝancegaleco.

Sako kun libroj sub la akselo li venas al nia renkontiĝo, inter la libroj troveblas la belega epopeo "La infana raso" de la trifoja kandidato por la Nobel-premio, Esperanto-poeto William Auld, poemoj de Attila József en Esperanto kaj romano de

Nemere verkita en Esperanto, kaj lernolibroj, el kiuj iu ajn povas lerni la lingvon dum kelkaj monatoj, kvankam nun ekzistas saĝtelefonaj aplikaĵoj por tio. "Mi estis dek tri jarojn aĝa, kiam mi trovis la faman lernolibron de Gyula Baghy sur la skribotablo de mia patro en 1971, kaj mi lernis Esperanton el ĝi tuj dum la somero", diras István. Li poste havis seriozan bankkarieron. – Mi estis nespekulanto en la mondo de spekulantoj. Mi kredas, ke ĉio havas teknologion, eĉ spekulado havas la sian. Mi havis problemojn pro korritmo en 2006, mi estas sesfoje operaciita, eliris el la financa mondo kaj retrovis la vojon al Esperanto. Nun mi ĉeestas prelegojn kaj kongresojn virtualajn de Brazilo ĝis Aŭstralio. Tiel mi renkontis ankaŭ la holivodulon David Peterson, kiu elpensas ĉiumonate novajn lingvojn por filmoj kaj teleserioj (kiel Dothraĥit kaj Valyria por la Batalo de la Tronoj – Red.). Grandan sukceson li ĝuas, ĉar li studis ankaŭ Esperanton antaŭe, kaj nun li estas jam pintomajstro de la ĝenro."

Poemfarantaj esperantistoj

Oni povus, kompreneble, reciti historietojn senfine, ekzemple, ke jam ankaŭ antaŭ longe iu urba poliestro malpermesis kunvenon de Esperantistoj pro timo, ke ĝi estas "ŝtelista lingvo", parolata de Esperantistoj, por ke policistoj ne komprenu, pri kio ili konspiras. Laŭ István, ni prefere parolu pri tio, kiom malmulte la civitanoj de la Unio, inkluzive hungarojn, estas informitaj pri la Konferenco pri la Estonteco de Eŭropo en Bruselo, ĉar aperas malmulte da novaĵoj pri ĝi en la hungara gazetaro, kie tamen multo povas esti decidita por la venontaj jardekoj. "Dek ses mil civitanaj proponoj estis ricevataj, en dek temaroj de edukado ĝis klimata protekto, kaj nun venas la fina akto, kie pli ol 170 rekomendoj, ellaboritaj de burokratoj en Bruselo, estos diskutataj kaj akceptitaj. Nia propono, kiu ricevis la plej multajn voĉojn de civitanoj en la fako de edukado, temas pri tio, ke Esperanto havas ecojn kompetento-evoluigajn kaj lingvolerno-faciligajn, kio jam sukcese testiĝis en la programo Erasmus +. Sed kvankam nia propono estas la plej populara, eĉ la parenteza listo de eblaj metodoj ne enhavas ĝin en la Rekomendo 32, kiu temas pri tio, ke ĉiuj lernu la lingvon de unu alia EU-lando, eĉ de antaŭlerneja aĝo, kaj atingu scigradon C1. Oni devus uzi nian metodon por helpi atingi pli rapide tiujn celojn. En Bruselo oni ne kuraĝas aŭ ne volas vidi la vorton "Esperanto", diras la prezidanto de la asocio, kiu jam kontentiĝus je du vortoj (*Multilingual Accelerator* – Multlingva akcelilo), por komenci pilotadon de Esperanto-edukado por lernejoj helpe de financado de EU jam ĉi-jare.

"Tio ne gravas por la nederlandanoj aŭ la germanoj, sed en Hungario ni uzas ĝin amase, ni perdos multe da mono, se ni malsukcesos. Esperanto protektas malgrandajn lingvojn. Oni tradukas esperanten siajn proprajn literaturajn verkojn, ni hungaroj tre intense faras tion, do tiuj, kiuj lernas Esperanton, havas multe pli grandan superrigardon kaj komprenon pri la literaturo de malgrandaj lingvoj ol tiuj, kiuj lernas nur la anglan aŭ konas nur la gepatran lingvon. Esperanto ne estas kontraŭ la gepatra lingvo, male, nek kontraŭ la angla. Oni devas agnoski la sciencan, ekonomian potencon de la angla lingvo en transdono de avangardaj konoj de la homaro. Mi ne

vivus, se mia kirurgo ne estus leginta pri la proceduroj, kiujn ili devis uzi operaciantem min sesfoje, mi estas Guinness-rekordulo,” diras István ridante. Tamen se oni informus pri Esperanto – Esperanto povus meti la piedon trans la sojlon – kiel la lupoj en la fabelo –, kaj oni povus konstati ankaŭ ĝian belecon. Evidentiĝus, kiom pli facila ĝi estas ol la aliaj lingvoj. El dek esperantistoj fariĝos dek unu poetoj, li mem ja versadas, faradas poemetojn. Li aldonas poste, ke ne ekzistas malamparolado en Esperanto – nek ili estas lupoj – kompreneble oni povas malami unu la alian, sed tiu lingvo estas maltaŭga por malamo.



Kroate pro amo

István nun kampanjas uzante sian antaŭan reton de kontaktoj, plejparte memstare, ĉar la asocio ne havas financajn rimedojn. Ĝi trudas en 20-kvadratmetra kelo en Zugló. Nu, tio ne estas tiel granda problemo en la virtuala mondo, sed ĝi estas malinda stato. Ĝus li ĉeestis konferencon pri la estonteco de Eŭropo en Strasburgo, kie li ankaŭ povis paroli por Esperanto. Li estis akceptita en delegacio kune kun kroataj esperantistoj de la prezidanto de la Komisiono pri Eŭropaj Aferoj de la Kroata Parlamento, ja la "multlingva akcelilo" estas rezulto de 30-jara disvolva laboro de kroata esperantisto. La kroatoj deklaris la esperantan tradicion en Kroatio parto de sia nacia kultura heredaĵo en 2019, kaj István nun eklaboris, por ke ĝi okazu ankaŭ en Hungario.

Mi ne postkuras miraĝojn, mi devas kapti ĉiun ŝancon. Mi ĉiam pensas pri la infanoj, la multaj lernantoj de la kvina klaso, kiuj ne komprenas, eĉ kion ili legas en sia gepatra hungara. Esperanto pruviĝis taŭga ankaŭ disvolvi ĉi tiun kompetenton. Estis provoj fari tion en Anglio jam en la 1920aj jaroj, kaj post unu jaro studentoj pli bone sciis ankaŭ la anglan sub influo de Esperanto. Tiutempe ni preskaŭ transsaltis la altan laton, nur pro franca rezisto ĝi ne fariĝis la lingvo de la Ligo de Nacioj, diras István nostalgie. – Fine ni havus veran rimedon, por moviĝi al ŝancegaleco, se nur estus malpli da infanoj, trasuferantaj la lernojarojn. Aŭ se ne 60-70, sed nur 50 elcentoj de la hungaroj ne scipovus paroli iun fremdan lingvon. Dume la lingva politiko de EU estas lerni du lingvojn krom la gepatra lingvo. Por hungaroj estas sufiĉe malfacile lerni kroman lingvon, kaj se ĝi ne estas la angla, ni estas eĉ pli malavantaĝitaj", li klarigas la maltrankviligan situacion. Laŭ li trompa estas ankaŭ la politiko de "du lingvoj", ĉar la dua certe ne estos la slovena aŭ la ĉeĥa aŭ lingvo de iu malgranda popolo, kvankam li mem lernis la kroatan pro "amo" kaj ankaŭ lernas la slovakon, ĉar kiel hungaro li volas doni ekzemplon por tio, ke niaj najbaroj sentu sin egalrajtaj.

Antaŭe, Esperanto ne estis en tiel malbona situacio, miloj da homoj parolis la lingvon, ĝi estis instruata ankaŭ en bazlernejoj, kaj poste kun la ŝanĝo de la politika reĝimo ĉio estingiĝis. De antaŭ dek kvin jaroj ne estis lanĉita nova kurso en Universitato Eötvös Loránd, kaj post kvardek jaroj ĉesis la trejnado de Esperanto-instruistoj. István nun provas savi ilian restantan bibliotekon por la Asocio – provizore stokante ĝin en sia propra subtegmento. "Ni kulturas Esperanton hodie, sed plie pro sindediĉo, kaj la lingvo mem estas bela, por esti amata. Mi vidas nin kiel Béres kaj liaj medicinaj gutoj. Béres sciis, ke li havas ion valoran en sia mano serve al la bonstato de la homoj en Hungario, kaj li luktis dum sia tuta vivo por transdoni ĝin. Ni ankaŭ scias, ke ni havas valoron en nia mano. Se mi estas hungaro kaj esperantisto, precipe la prezidanto de la asocio, estas mia devo klopodi igi la socion konscii tion.

Ekzistas, kompreneble, grandaj opinioinfluantoj, kiel la patro de la famaj filinoj ŝakistinoj Polgár, kiu diras, se vi volas bonon por via infano, komencu per Esperanto. Li komencis tiel kaj liaj filinoj estas ĉiuj perfektaj. Mi konas eĉ en Hungario familiojn, kiuj havas Esperanton kiel denaskan lingvon, nur tiel ili parolas kun siaj gefiloj. Esperantistoj havas ankaŭ malgrandan libreton, la Pasportan servon, kiu estas havebla rete kaj presite. Ĝi enhavas adresojn el multaj landoj tra la mondo, kie esperantistoj povas senpage tranokti sur reciproka bazo. Esperantiston, eĉ se li venas el la alia flanko de la mondo, mi fidas kaj akceptas", listigas István la specialajn avantaĝojn de sia kara lingvo.

Li ankaŭ havas longhorizontajn viziojn pri tio, se ankaŭ en aliaj EU-landoj la akiro de diplomo postulus mezgradan ekzamenon pri fremdlingvo. Miloj da studentoj anoncus sin, por lerni Esperanton, merkatoj aŭtomate povus esti kreitaj en multaj, multaj landoj, organizante sin kaj kreante laborpostenojn relative dum mallonga tempo. Tiam ne nur valorus studi Esperanton por la diplomo, sed junuloj povus iri helpe de

ĝi al multaj lokoj. Post ties enkonduko ĉi-lande, mirinde, 35.000 homoj prepariĝis por la lingvoekzameno B2 en Esperanto, kun 250 instruistoj. Estis verkitaj ankaŭ multe da lernolibroj, kaj la ŝtato ne devis aldoni pli ol starigi ŝtatan ekzamenkomisionon. Do investi en ĝin oni tamen devas iom, kaj oni bezonas 3-4 monatojn da efektiva studado, kaj post jaro kaj duono atingeblas nivelo de literaturo. Ekzemple, por legi unu el la plej mirindaj dramoj "La infana raso" de aŭtoro trifoje kandidatigita por la Nobel-premio, inspirita de la esperanta traduko de "La tragedio de l' homo". Kiu cetere estis ĵus tradukita en la maltan pere de Esperanto. Kaj tio validas ankaŭ inverse, Béla Vikár, ekzemple, vane lernis la kartvelan per jaroj da laboro. Li petis helpon de kartvela esperantisto laŭ konsilo de Sándor Geisswein, la tiama prezidanto de Esperanto-Asocio por traduki la nacian epopeon de Ŝota Rustaveli, *La Kavaliro en Panterfelo*.

Esperanto, kiel la hungara, kapablas reprodukti la heksametran poemon tute perfekte: "Jen floras ankoraŭ la floroj en valo" – li jam recitas entuziasme...

La Lingvo Internacia, t.e. Esperanto estas la plej vaste parolata artefarita tamen vivanta lingvo. La nomo devenas de Doktoro Esperanto: Lazar Markoviĉ Zamenhof, pola okulkuracisto kaj filologo, patro de Esperanto, kiu eldonis sub ĉi tiu pseŭdonomo sian unuan lernolibron. Li volis krei facile lerneblan kaj politike neŭtralan lingvon, kiu transpasas la limojn de naciaj kulturoj, akcelas pacon kaj internacian komprenon. La nombro de Esperanto-parolantoj estas taksita inter 500 000 kaj 2 milionoj en 120 landoj. Ekster Eŭropo, ĝi estas plej populara en la Malproksima Oriento kaj Brazilo.

Tradukita el hungarlingva artikolo:

https://www.nepszava.hu/3155275_eszperantoul-nincs-gyuloletbeszed-az-eu-ban-lobbiznak-a-soknyelvu-gyorsitoert – Publikita la 1an de majo, 2022.

Tradukis Jozefo HORVATH